

*Prisloniĥa,
gepatra vilaĝo de la pentristo*



Ĉi tie loĝis Plastov-familio en Prisloniĥa



*Preĝejo en Prisloniĥa, kiun konstruis la avo de
A. Plastov*

Vidindaĵoj en Uljanovsk



Muzeo de arto en la urbo portas lian nomon



*Omaĝe al A.A. Plastov en la jaro 2000 estas
inaŭgurita Plastov-monumento (skulptisto
A. Biĉukov)*


Aŭtoroj: Margarita Karceva, Olga Gaŝneva



***ARKADIJ PLASTOV,
POPOLA PENTRISTO***

*Urba
Esperanto-klubo
100 jaroj*






Plastov Arkadij Aleksandrovič naskiĝis la 31 (18)-an de januaro 1893 en vilaĝo Prisloniĥa (Uljanovska regiono) en familio de kamparano. Dum tri jaroj li vizitis lernejojn kaj poste (1903) eklezian lernejojn. En la jaro 1912 li decidis ricevi artan klercon. Tial li veturis al Moskvo kaj studis tie kelkan tempon en metiejo de pentristo I.I. Maŝkov. Poste oni instruis lin dum du jaroj en Cara Stroganov-lernejo. Plue li okupiĝis pri skulptado. Liaj instruistoj estis meritaj pentristoj kaj skulptistoj: S.M. Volnuhin, A.M.Korin, A.M.Vasnecov, A.E.Arĥipov k.a.

En la jaro 1917 li revenis al la gepatra vilaĝo. Tie li okupiĝis pri pentrado, konstante laborante laŭnature. Liaj samvilaĝanoj estis kutime ĉefpersonoj en liaj bildoj.

Ekde 1935 li pentris ĝenrajn bildojn: "Kolĥoza festo" (1937), "Kolĥoza brutaro" (1938) k.t.p. Li iĝis popola pentristo de Soveta Unio, ricevis multajn premiojn.

Li forpasis en la jaro 1972 (la 12-an de majo) kaj estis entombigita apud Prisloniĥa.



Somere (1954)

Multaj bildoj montras vilaĝan vivon : "Grenrikolto" kaj "Herbfalĉado" (ambaŭ pentritaj en la jaro 1945 kaj premiitaj per Stalin-premio en la jaro 1946). "Oni veturas al baloto" (1947), "Kolĥoza draŝejo" (1949), "Vespermanĝo de traktoristo" (1951), "Fonto" (1952), "Somere" (1954).

Arkadij Plastov pentris infanojn kun granda plezuro. Li ofte diris: "Pentri infanetojn estas granda ĝuo por mi".



Grenrikolto (1945)

Multaj bildoj estas dediĉitaj al la Granda Patria milito. La plej fama pentraĵo estas "Faŝisto preterflugis" (1942)



Bone konata kaj pridiskutita estas lia pentraĵo "Printempo". La ĉefpersonon de tiu bildo oni nomas "Norda Venuso".

En la jaro 1966 li ricevis Lenin-premion pro siaj pentraĵoj, dediĉitaj al vilaĝa vivo. La plej bela inter ili estas „Vilaĝa marto“, kiun oni iufoje nomas „perlo de Plastov-peniko“. Estas malfacile kompari iun kun A.Plastov pro lia kapablo prezenti sunlumon. Kiel sorĉisto li plenigis per ĝi siajn bildojn. Li ĝuis naturon, alvokis ŝati ĝin kaj zorgi pri ĝi.

Dum sia vivo Arkadij Plastov pentris pli ol dek mil bildojn. Li eksponis ilin en Moskvo (1976) kaj Leningrado (1978). La bildojn de A.Plastov oni povas vidi en diversaj muzeoj de nia lando. Se vi rigardos ilin, vi tuj sentos rusan animon, ĉar ili estas naciaj laŭ sia spirito.

Li faris multe da ilustraĵoj, ekzemple al poemo de N.A.Nekrasov "Frosto, Ruĝa nazo" (1948), al "La kapitanfilino" de A.S.Puŝkin, al verkoj de L.N.Tolstoj kaj A.P.Ĉeĥov.

Sagaca psikologo, inspirplena poeto, serioza pensulo, senlaca laborulo – tia estis Arkadij Aleksandrovič Plastov, popola pentristo.